

Recenzo pri

## *Universalaj Lingvoj en Svislando*

de Andreas Künzli

Gonçalo Neves

Künzli, Andreas (2007). *Universalaj Lingvoj en Svislando*. *Svisa Enciklopedio Planlingva*. *Encyclopédie suisse des langues planifiées*. *Schweizer Plansprachen-Lexikon*. *Enciclopedia svizzera delle lingue pianificate*. La Chaux-de-Fonds: SES, CDELI. 1129 pp. ISBN 2-9700425-2-5.

POST MULTJARA ESPLORADO KAJ VERKADO la svisa slavisto, filologo-historiisto, interlingvisto kaj informadikisto Andreas (Andy) Künzli (naskita 1962) finfine lanĉis en la mondon sian verkon *Universalaj Lingvoj en Svislando*. La fizika produkto de lia laborego estas kolosa libro 1120-paĝa, unu el la plej dikaj ĝis nun aperintaj en esperanto.

Tamen la nunan verkon karakterizas ne nur pezo kaj diko. Ĝi estas grava enciklopedio, science ellaborita, zorge redaktita, bele verkita, riĉe ilustrita kaj plaĉe presita. En ĝi la aŭtoro sisteme kaj detale kolektas, prilaboras, prezentas kaj komentas faktojn kaj datojn pri la historio de la planlingvaj movadoj en Svislando, precipe de esperanto, sed ankaŭ de volapük, ido, occidental-interlingue kaj interlingua, kaj eĉ de malpli konataj projektoj.

La fono estas Svislando, teritorio plurlingva kaj plurkultura, ideala scenejo kie ĉiu el la kvin ĉefaj planlingvoj supre menciitaj sukcesis varbi gravajn adeptojn, fondi societojn, eldoni gazetojn kaj naski interesan movadon. Künzli prezentas la homojn – svisajn aŭ alilandajn – kiuj ludis rolon en tiuj movadoj en Svislando.

La verko estas tre ampleksa kaj bunta. Ĝin malfermas kvar antaŭparoloj. La unuan, mallongan kaj cirkonstancan, verkis en esperanto Bruno Graf, prezidanto de Svisa Esperanto-Societo, kiu tuj en la dua alineo montras interlingvistikan malkleron kaj eĉ kontraŭdiras la titolon de la verko (*Universalaj lingvoj* – jes, plurale – en Svislando), kiam li asertas ke “La atingiĝo de Esperanto estas, ke ĝi fariĝis vivanta lingvo, dum la aliaj projektoj restis projektoj”. La dua, france verkita de Jacques-André Humair, direktoro de la Biblioteko de La Chaux-de-Fonds, donas kvazaŭ oficialan tonon al la entrepreno. En la tria Claude Gacond rakontas en esperanto tre interesajn spertojn pri sia laboro kiel arkivisto ĉe CDELI. En la kvara, ankaŭ en esperanto sed kun germana resumo, Künzli prezentas la metodikajn aspektojn de sia projekto.

Tre grava kaj leginda teksto, en kiu la aŭtoro skribas i.a. ke “La historiisto devas okupiĝi pri la kaŭzologio, por fine eltrovi la historian veron, sen apliki ideologian historiismon, sen transformi la historion al propagando, sen krei el ideologio eĉ utopion aŭ mitologion. Ne metafiziko, spekulacioj aŭ antaŭjuĝoj interesu la seriozan sciencan esploriston, sed ekzaktaĵoj faktaj, empiriaj observoj, praktikaj spertoj. Historia scienco ne estu praktikata – aŭ misuzata – por manipuli la faktojn. Kelkfoje historiistoj frontas la danĝeron beligi la historion, glorigi faktojn aŭ legendojn, eĉ kun plej noblaj intencoj. Ankaŭ la adeptoj de la planlingvoj ne estas liberaj de tiaj tentoj” (p. 28–29). Jes, Künzli pravas, ankaŭ ili ne estas liberaj, sed mia impresio kiel leganto, kiel mi montros dum la recenzo, estas ke la aŭtoro sukcesis liberiĝi de tiuj tentoj kaj brile plenumis la supran programon, tiel klare kaj sincere vortumitan.

### Sep enkondukaj tekstoj

La antaŭparolojn sekvas sep enkondukaj tekstoj en la kvar oficialaj lingvoj de Svislando plus (sen evidenta kaŭzo) la angla. En la unua, 28-paĝa, abunde dokumentita per 69 ampleksaj piednotoj plenaj je referencoj, Künzli germane donas historian superrigardon pri la planlingvaj movadoj kaj interlingvistiko kaj klopodas respondi sian komencan demandon, ĉu la temo estas eksmoda en nia tempo de tutmondigo. En la dua, 17-paĝa, Claude Gacond france prezentas siajn pripensojn pri tutmonda humanismo. Lia teksto enhavas gravajn informojn pri la strukturo de esperanto, tre interesajn por ekstera publiko, sed bedaŭrinde ankaŭ fantaziajn troigojn (p. 71: “Esperanto jam troviĝas inter la 10 internacie plej uzataj lingvoj”; p. 75: “Dum la franca neripareble perdis terenon, Esperanto, male, disvastiĝis tra la tuta mondo”; p. 76: “Leksike Esperanto estas preskaŭ ĉiam lingvo pli preciza ol la franca”) kaj nedokumentitajn asertojn (p. 82: “Lejzer Zamenhof analizis la funkciadon de aglutinaj lingvoj kiel la finna, la estona, la hungara kaj la turka, kaj de izolaj lingvoj kiel la mongola kaj la ĉina”). En la tria, 22-paĝa, bone dokumentita, Claude Piron france prezentas interesan komparan studon pri la diversaj komunikmetodoj uzataj en internaciaj organizaĵoj kaj la sola uzata en esperantaj medioj. En la kvara, 18-paĝa, Tazio Carlevaro donas itale tre bone strukturitan lecionon pri interlingvistiko kaj planlingvoj. En la kvina, 8-paĝa, en la angla (tradukita de Roy McCoy), Claude Piron prezentas sian ideon pri esperanto kiel nova formo de humanismo. En la sesa, 9-paĝa, Künzli germane donas koncizan historian superrigardon pri la planlingvaj movadoj kaj interlingvistiko en Svislando. En la sepa, nur 2-paĝa, Arthur Baur en la romanĉa prezentas kelkajn ekzemplojn kiuj celas pruvi ke ĝi estas planlingvo, same kiel esperanto. El la sep enkondukaj tekstoj, nur la du aŭtoritaj de Künzli estas unuafoje aperantaj.

**La torso de la libro: kvin planlingvoj**

La enkondukajn eseojn sekvas kvin sekcioj, dediĉitaj al la kvin ĉefaj planlingvoj laŭ kronologia apero (volapük, esperanto, ido, occidental-interlingue, interlingua), kaj sesa pritraktanta malpli konatajn projektojn kaj ceterajn planlingvajn temojn. Temas pri la torso de la verko, pri la propre enciklopedia parto. La esperanta sekcio kompreneble estas la plej ampleksa (358 pp.), sekvata de tiuj pri ido (22 pp.), occidental-interlingue (14 pp.), volapük (11 pp.) kaj interlingua (8 pp.). La sesa sekcio, surprize longa (32 pp.), pritraktas 30 projektojn. La sekcioj konsistas el apartaj artikoloj alfabeto ordigitaj, pritraktantaj la individuojn (ĉirkaŭ 500), grupojn, sociojn, gazetojn, verkojn, domojn, urbojn, kongresojn, ejojn, iniciatojn kaj objektojn kiuj armaturas la longan kaj vervan aktivadon de la planlingvaj movadoj en Svislando.

La ses menciitaj sekcioj konsistigas la propre Künzli-an parton de la verko. La aŭtoro mem verkis ĉiujn artikolojn, en esperanto, per stilo klara, flua kaj plaĉa, kiu feliĉe kontrastas kun la pezaĵaj vortumoj de multaj el la paĝoj de la enciklopedieca *Esperanto en Perspektivo*, grava referenca verko 844-paĝa eldonita de Universala Esperanto-Asocio en 1974. Mi ne povas eviti komparon ankaŭ kun la fama *Enciklopedio de Esperanto*, eldonita de Literatura Mondo en 1933. Ankaŭ en ĉi tiu verko, ankoraŭ grava hodiaŭ, la artikoloj estas skribitaj per flua lingvaĵo. Tamen ili ofte konsistas nur el teda sinsekvo de datoj, eventoj, postenoj kaj verkoj. En la enciklopedio de Künzli, kontraste, la artikoloj estas variaj kaj vivecaj, kvankam ne malpli science ellaboritaj. La svisa aŭtoro ne ellasas faktojn kaj datojn sed sukcesas ilin dozi meze de teksto kiu fluas mem kaj tial legeblas kvazaŭ aro da etaj ĉapitroj el grandioza romano. Legi la verkon de Künzli estas plaĉa aventuro. Se oni hazarde elektas artikolon kaj komencas legi, oni ne plu kapablas halti. Ĝi vekas la intereson (pro la temo mem sed ankaŭ pro la pritrakto) kaj resendas al aliaj artikoloj, kaj ĉi tiuj al plusaj. Oni do navigas tra la libro kvazaŭ inter retpaĝoj, libere kaj avide. La aŭtoro, eble dank' al sia informadika profesia sperto, sukcesis rekrei en ĉi tiu verko la etoson kaj ĝuon de interreto. Tio estas aparte malfacila tasko kaj konsistigas unu el liaj multaj meritoj.

**Historiisto kaj enciklopedia verkisto**

Tamen ne nur pro tia lerta rekreo kaj enetosigo Künzli meritas aplaŭdon. La recenzata verko lin pruvas ankaŭ kompetenta historiisto kaj talenta enciklopedia verkisto. Li metas la individuojn en la centron de la historio prezentante ne nur ties agojn, sed ankaŭ ties pensojn, hezitojn, aspirojn kaj dezirojn, ĉiam surbaze de dokumentoj, sen spekulativo, sen fantazio. La individuoj aperas ne nur kiel historiaj agantoj aŭ plenumantoj, sed ankaŭ kaj eĉ precipe kiel personoj, kun siaj meritoj kaj virtoj sed ankaŭ kun mankoj,

kapricoj kaj manioj. Tial li ne hezitas prezenti ankaŭ faktojn kaj eventojn kiujn aliaj historiistoj – pli kabinetaj kaj severaj – eble opinius minoraj, aŭ eĉ anekdotaj. Ankaŭ tio estas tre malfacila tasko, ĉar tia historiisto devas esti tre singarda, sobra kaj takta por ne fali en la danĝeran kaj tentan marĉon de klaĉemo. Ankaŭ ĉi-kampe Künzli plene sukcesis.

Alia rifo kiun historiistoj ne ĉiam sukcesas eviti estas ia (sub)konscia ideologiigo de la historiaj aktoroj kaj scenaro. Ĝin ne sukcesis eviti Drezen (1892–1937) en pluraj partoj de sia cetera tre bona, mejloŝtona kaj plu konsultinda *Historio de la mondolingvo* (1928–1930). En la enciklopedio de Künzli, male, la individuoj ne estas nuraj marionetoj aŭ risortoj de ideologioj aŭ sociaj fortoj. Ili pensas kaj agas mem, ili faras la historion anstataŭ pasive kaj inerte spekti ĝin. Ilin ne puŝas obskuraj tendencoj aŭ partiaj brevieroj, eĉ kiam ili havas kaj manifestas politikajn, sociajn aŭ religiajn simpatiojn kaj preferojn. Ili estas la kerno kaj la motoro de la historia disvolvo. Liberiginte la historian fluon de la ideologia feĉo kiu ĝin malklarigis dum la 19-a kaj 20-a jarcentoj, Künzli sukcesas komuniki ĝian tutan esencon kaj regali la leganton per produkto ankoraŭ ne remaĉita, kiun la leganto mem, sen trudita kuratoreco, povas ĝui, interpreti kaj primediti. Iasence la aŭtoro revenas al la pureco de la helenaj historiistoj, sed evidente riĉigante ĝin per la sciencaj metodoj de moderna historiografio.

Alia menciinda faceto de la aŭtoro estas lia objektiveco. Ĉi-verke li pritraktas ne nur figurojn kies korpojn jam longe glutis la patrino tero, sed ankaŭ homojn ankoraŭ vivantajn kaj agantajn, homojn kun opinioj kaj metodoj foje polemikaj, foje diverĝaj de tiuj kiujn la aŭtoro manifestis private kaj publike, skribe kaj parole, dum sia esperantista vivo. Tamen kiel honesta historiisto Künzli sukcesas submeti la koron al la intelekto. Li prezentas faktojn kaj figurojn kaj komentas ilin, sed liaj komentoj ĉiam impresas racie, sobre kaj ekvilibre. Ili ne trudiĝas, ne celas konvinki aŭ persvadi, eĉ ne gvidi la leganton, sed nur ilustras kaj prilumi la eventaron.

La objektiveco de la aŭtoro plene manifestiĝas en lia pritrakto de polemikaj figuroj kaj faktoj. Ekzemple liaj longaj artikoloj pri la tiel nomata Civito kaj ties konsuloj (p. 242–249), pri Serge Reverdin (naskita 1942), pli konata kiel (reĝo) Parzival', kies ekstravaganca maniero propagandi esperanton damaĝas la bildon de la movado (p. 618–620), kaj pri Gonzague de Reynold (1880–1970), aristokrato kaj profesoro kiu verkis tre malfavoran raporton pri esperanto kaj malhelpis ties eventualan agnoskon fare de Ligo de Nacioj (p. 621–626), estas vere modelaj kaj atestas la eksterordinaran kapablon de Künzli teni sin objektiva kaj senpartia kiel historiisto, malgraŭ siaj konvinkoj kiel movadano.

Lia objektiveco ne ŝanceliĝas eĉ kiam li pritraktas aliajn planlingvojn kaj ties delikatajn temojn, kiel ekzemple la fondon de *Verband für die Schaf-*

*fung eines Weltspracheamtes* ‘Asocio por la starigo de universallingva oficejo’, okazintan en 1911, dum plena ido-esperanta antagonismo (p. 811–812).

## Du eraroj

La verko de Künzli estas tre zorge ellaborita kaj redaktita. Fakajn erarojn mi trovis nur du, en la artikolo “Ido en Svislando”, en la sama frazo (p. 793). Künzli skribas ke “La 24an de oktobro [de 1907], post la fino de tiuj kunsidoj, la koncerna komisiono de la Delegitaro decidis adopti principe Eon, kun la kondiĉo, ke estu enkondukitaj en ĝi reformoj surbaze de la konkludoj prezentitaj en la broŝuro *Les vrais principes de la langue auxiliaire* [...]”. Unue la aŭtoro ŝajne konfuzas la komitaton de la Delegitaro (kiu ja faris la menciitan decidon la 24-an de oktobro) kun la konstanta komisiono, kiun la komitato nomumis samdate por plua laborado. Poste li mencias broŝuron kiun la komitatoj evidente ne povis konsulti en 1907, ĉar ĝi aperis nur en 1908.<sup>1</sup> La komitata raporto<sup>2</sup> ja parolas pri “la projekto de Ido (kiun la komitatoj ricevis sub la formo de elementa gramatiko, kompleta gramatiko, ekzercaro kaj specimena vortaro)” (p. 21). Otto Jespersen (1860–1943), unu el la komitatoj, en interesa artikolo publikigita en la gazeto *Novialiste* (decembro 1937)<sup>3</sup> parolas nur pri “presita kompleta gramatiko kaj kelkaj tajpitaĵoj folioj da vortaro”. La bibliografio de Carlevaro/Haupenthal<sup>4</sup> mencias nur unu kompletan gramatikon aperintan en 1907,<sup>5</sup> do verŝajne ĝuste ĉi tiun ricevis kaj dum kvin sinsekvaj kunsidoj analizis la komitatoj en Parizo. Pri la ceteraj dokumentoj oni scias nur ke ili publikigis unufoje nur en 1908, kaj ne plu sub la pseŭdonimo *Ido*.<sup>6</sup> Verŝajne en 1907 ekzistis praversio tajpita aŭ eĉ presprova. En la fontindikoj, kiuj okupas 28 paĝojn, Künzli sciigas ke la menciitan tekston li verkis “laŭ artikolo (nepublikigita) de T. Carlevaro” (p. 1029). Iom surprize, unue ĉar ekzistas fidindaj fontoj publikigitaj, due ĉar de Carlevaro, eminenta fakulo pri la temo, oni ne atendus tiajn erarojn. Eble ĉi tiuj estiĝis ĉe Künzli post mallongigo de pli frua versio, kiu menciis ambaŭ broŝurojn kaj ambaŭ organojn de la delegitaro. Iom nekongrua kun la serioza kaj scienca tono de la tuta enciklopedio mi trovas ankaŭ jenan

<sup>1</sup>Ido: *Les vrais principes de la langue auxiliaire*. Étude pratique dédiée à tous, mais surtout aux Espérantistes. Paris 1908 (2-a eldono 1909): Imp. Chaix. 31 pp.

<sup>2</sup>Couturat, Louis; Leau, Léopold: *Compte rendu des travaux du Comité (15–24 octobre 1907)*. Par les secrétaires L. C. et L. Leau. Délégation pour l’adoption d’une langue auxiliaire internationale. Paris /Coulommiers/ 1910: Imp. Brodard. 3 + 32 pp.

<sup>3</sup>[www.geocities.com/athens/forum/5037/menlab.html](http://www.geocities.com/athens/forum/5037/menlab.html)

<sup>4</sup>Carlevaro, Tazio; Haupenthal, Reinhard: *Bibliografio di Ido*. Bellinzona/Saarbrücken 1999: Hans Dubois / Edition Ittis. 193 pp.

<sup>5</sup>Ido: *Grammaire complète de la Langue Internationale / Kompleta gramatiko di la Linguo Internaciona*. Paris 1907 (privat edito). 71 pp.

<sup>6</sup>de Beaufront, Louis: *Grammaire élémentaire et exercices*. Ekzercaro. Paris: Delagrave, 1908. 61 pp.

aserton de la redaktoro: “I. do povas esti karakterizita iusence kiel Eo sen homaranismo, sen akuzativo kaj sen supersignoj” (p. 794). Ĉi tie Künzli strange miksas gramatikon kun socia strebado kaj donas malĝustan bildon pri grava planlingvo. Li distriĝis dum momento, kiel Homero . . .

### Ilustraĵoj

La ses sekciojn ilustras la impresa kvanto da 1270 fotoj, precipe de individuoj, sed ankaŭ de grupoj, domoj, kongresejoj, sidejoj, oficejoj, libroj, broŝuroj, gazetoj, prospektoj, informiloj, desegnoj, karikaturoj, poŝtmarkoj, glumarkoj, pentraĵoj, tomoŝtonoj, memorŝtonoj, memortabuloj, afiŝoj, kartoj kaj eĉ bushaltejoj kaj vojmontriloj. La fotoj estas bonkvalitaj kaj nigra-blankaj, krom kelkaj koloraj sur libromeza fasko da glaceaj folioj.

### Antologioj

La sekciojn dividas 40 antologiaj tekstoj, precipe pri la planlingva temaro, verkitaj de “signifaj personecoj” (laŭ Künzli), preskaŭ ĉiam svisaj civitanoj. Ĉi tie ni renkontas klasikajn nomojn (Zamenhof, Privat, Hodler, Baghy, Carlevaro, Piron, Gacond, Silber, Ostwald, Berger, Schild) apud aliaj malpli konataj. La tekstoj estas verkitaj precipe en esperanto (20), la germana (8) kaj la franca (7), sed troviĝas ankaŭ po unu teksto en la angla, ido, interlingue, interlingua kaj eĉ en volapük (kun paralela traduko en la germanan). Ĉiujn tekstojn antaŭas detala esperantlingva enkonduko plume de la redaktoro. Künzli ne hezitis enmeti ankaŭ tekstojn kiuj akre kritikis esperanton, kiel la menciitan (longan) raporton de Gonzague de Reynold (p. 581–611) kaj eĉ la faman pamfleton de Charles-Albert Cingria (p. 282–288), eble la plej vitriolan tekston ĝis nun verkitan kontraŭ la lingvo de Zamenhof. La antologiaj tekstoj estas ĝenerale tre interesaj kaj ege riĉigaj la volumon. Tamen en unu el ili (*Survoje al la dua jarcento de Esperanto*, de Claude Gacond) mi trovis tri bizarajn asertojn (p. 843): “Oni prave sentis [La Ligo de Nacioj, en 1922], ke la zamenhofa lingvo ne estis akirinta sufiĉan maturecon por fariĝi laborlingvo en monda organizaĵo” (kio frape kontraŭdiras la enhavon de la koncerna enciklopedia artikolo); “Interlingua [...] estis bazita sur latina centrismo science nepravigebla” (mankas ekspliko); “La interlingvistikaj esploroj ne naskas plu novajn projektojn” (kio ne estas vera).

### Bibliografio

Laste mi menciu la vastan bibliografion (44 pp.), la nomindekson (bedaŭrinde nedetalan) kaj la finan legoŝlosilon de esperanto (france kaj germane), tre utilan, aŭtoritan de Claude Gacond, Jean-Thierry von Büren kaj Richard

Schneller, por helpi la konsulton de la enciklopedio fare de homoj sen antaŭa esperantoscio. Mi tamen sentas la mankon de bildindekso.

### Fina impresio

Mia fina impresio estas tre favora. La enciklopedio de Künzli estas unu el la plej gravaj sciencaj verkoj ĝis nun verkitaj en esperanto, se ne la plej grava. Mi menciis ke multaj el la pritrakitaj figuroj ne limigis sian agadon al Svislando. Ili ne estis lokaj movadanoj. Ili agis ankaŭ eksterlande kaj grave influis la internaciajn movadojn de volapük, esperanto, ido, occidental-interlingue kaj interlingua. Tial ĉi tiu verko interesas ne nur svisajn esperantistojn, sed la tutmondan adeptaron de la kvin ĉefaj planlingvoj kaj ankaŭ ajnan fakulon aŭ studemulon pri interlingvistiko. Ĝi estas verko kiu ne povas manki sur la breto de ĉiu serioza planlingvano kaj interlingvisto. De nun oni abunde referencos al ĝi kaj nomos ĝin simple *La enciklopedio de Künzli*. Ĝi estos *La Verko*.

#### *Pri la aŭtoro*

Gonçalo Neves (naskita 1964) estas tradukisto kaj leksikografo. Iama membro de la Akademio de Esperanto (1995–1998). Li publikigis la poemarojn *Ibere libere* (1993, kun aliaj) kaj *Simptomoj* (2000) kaj la novelarojn *Kompreni* (1993) kaj *Ekstretoj* (1997, kun aliaj).

#### *Adreso de la aŭtoro*

Gonçalo Neves ([g-neves@clix.pt](mailto:g-neves@clix.pt)),  
R. Camilo Castelo Branco, 34, 4 Dt  
PT-2870-015 Montijo, Portugalio